

La letero de l' Akademio de Esperanto

N-ro 26 : Januaro – Februaro – Marto 1994

ISSN 0986 - 1181

Ĉefartikolo



Esperanto, "literatura lingvo"

Okazis en Santiago de Kompostelo (Galecio*, nord-okcidenta provinco de nuna Hispanio) evento, kiu certe ne estos vaste diskonigata de la diversaj nacilingvaj ĵurnaloj kaj ankaŭ ne – sed pro tute aliaj motivoj – de la Esperanta gazetaro, sed ĝi estu atentata de ni ĉiuj pro sia graveco.

Efektive la PEN-klubo Internacia tie kunvenis kaj en tute pragmata maniero agnoskis Esperanton, kiel literaturan lingvon!

PE.N. unue estis siglo signifanta "Poetoj, Eseistoj kaj Novelistoj". Ĝi fariĝis akronimo PEN kaj oni ludis kun la Angla vorto "pen" (plumo) por nomi tiun internacian verkistan asocion fonditan en 1921. Ĝi vivas dank'al ties membroj, pli ol 10 000 verkistoj, kiuj animas pli ol cent "PEN-centroj", aŭ "PEN-klubojn", tra la mondo. Ekzemple, la Franca "PEN-klubo" estas forta kun siaj 500 membroj kaj povas orgojli pri diversaj prestiĝaj prezidantoj tra la jaroj : Anatole France, Paul Valéry, Jules Romains ...

En Santiago estis agnoskitaj ses novaj centroj : la Kazaka**, la Kirgiza, la Bosnia, la Kimra, la Urugvaja kaj la Esperanta.

Oni povas legi en "La Voz de Galicia" (la voĉo de Galecio) jenon en la Galeca : "La PEN internacia akceptis kiel plenrajtan membron la PEN-klubon Esperantan, kiu estis fondita en 1991 kun sidejo en Svislando. La fakto kontentigis la verkistojn reprezentantojn de tiu klubo, kiuj ĉeestis la kongreson kiel nuraj observantoj. Tiuj sin mem difinas kiel membroj de unika komunumo, realaĵo sen landlimoj, tiel ke la PEN Esperanta havas strukturan analogion kun la Jidiŝa kaj la Romna***."

Agnosko de PEN estas nur agnosko de privata asocio. Kaj unu hirundo ne sufiĉas por anonci la printempon. Tamen ni gratulu la PEN Esperantan : niaj oponentoj – ekzemple en iuj Francaj ministerioj – devus komenci novan serĉadon al aliaj argumentoj kontraŭ nia lingvo. Tiu pri la Esperanta literatur-manko riskas esti baldaŭ denunciata de ĉiuj ĝisdatuloj!

Kaj nun? Ni povas diri du aferojn kaj unu trian : pordo estas malfermita, kiu ebligos baldaŭ malfermi aliajn; Raŭmistoĵ decidapaŝe vojis al la "fina venko" : nia movado estas unueca!

D-ro André ALBAULT

*) Galecio, el la Latina Gallæcia, Ge. Galicia, eks-Franca Gallécie, nuna Franca Galice, lando en kiu vivas la Galecoj (L. Gallæci, F. Galiciens, Ge. Galegos).

**) Kazaka, formo internacia kaj loka. Oni ĝin preferu al "Kazaha", kiu estas Rusismo. Turko-Tatara lingvo parolata en Kazakistano de la Kazakoj.

***) Romna, lingvo parolata de la Romnoj (iuj Ciganoj); formo asimilita al Esperanto, jam antaŭ la Unua Mondmilito, de Valéri Bernard (1860 – 1936), Okcitana poeto kaj verkisto. Al la Romnoj, kiuj vivas "senlande, sole, senmastre", li dediĉas sian 409-versan "Kanton de la Nomadoj" (en Esperanto) kaj sian romanon "Lei Boumian" (La Ciganoj). Romna devenas de la Romna nomo "Romani" sensanĝe trovebla en diversaj lingvoj. Ĝia radiko estas "Rôm" (homo).

La ĉefartikolo de numero 25 estigis kelkajn reagojn : ni provos doni respondojn en la sekva numero!



KRONIKO DE LA NUNTEMPO

Du militas, tria profitas!

Krom la "Centjara milito" pri la ĉapelaj supersignoj kaj la baldaŭ centjariĝa konflikto pri la "ITA / ATA" dialektiĝo, jam de pli ol unu jardeko la etoso en Esperantio iĝas pli kaj pli streĉe akra

...
Jen unu senĉese kritikadas en diversaj gazetoj, jen, sub formo de pompa satiro (kies ideojn Raymond Schwartz ne hezitus kvalifiki "tro alte ŝraŭbitaj"), alia aperigas nuran pamfleton ...

Jen unu deziras anstataŭigi la tradician alfabeton per la Araba, kiu en liaj okuloj aspektas pli estetika (se ne pli simpla!), jen alia proponas reformon de la tuta vortaro por iu "bona" lingvo! ...

Jen unu obstinas pri senfina neologismemo, jen aliaj pri modifo de sia landnomo; unu altrudas siajn vortordajn regulojn, aliaj ... pretendas arkaismigi la sufikson *-in* (kial ne ankaŭ la pronomon *ŝi*?)

Kaj tiel plu ... Ja ĉio ĉi-supra per si mem restus bagatela, almenaŭ se ĝi ne eksteriĝus el la kadro de harfendado pri la sekso de l'angeloj! Bedaŭrinde ĝi estigas ofte polemikon, kiu – se vidate el "Siriusa vidpunkto de Voltero", povas klarigi nur kial KABE iam kabeis! Ne temas pri "entuziasmo, per kiu niaj homoj utiligas la Internacian Lingvon por liberiĝi je siaj diversaj sociaj frustiĝoj ...", sed ja pri nura tempoperdo! Kaj kiuj profitas el tia "vortolakso"? Certe ne la ge-"malsami-deanoj", sed pli ĝuste le ge-mal-"esperantistoj"! ...

Ĉi-monate mi havis la okazon ĉeesti specialan kunvenon de ĉiuj kursgvidantoj de la Pariza Regiono (al kiu ajn asocio ili membriĝas); kaj mi feliĉe povis konstati, kian pozitivan kunagadon povas produkti ilia kunestado ... Ĉu la ĉefa celo ne estas la komuna uzado de la Lingvo Internacia tra la mondo? La cetero restas nur "vortoj"!

J. T.

*) Esprimo el "Kiel akvo de l'rivero".

***) Citaĵo el leter-reproduktado en "EVENTOJ" de la pasinta jaro.

****) Esprimo el la filmo "Angoroj".

Legite en "Esperanto aktuel" 8 / 93 - En la rubriko "leteroj de legantoj" NDLR deklaras :

"... Mi altrudas mian opinion al neni. Kaj kiam mi en Ea 6 / 93 publikigis la leteron de s-ro Günkel, mi sciiis, kio sekvos. Kaj mi scias, kio sekvos post tiu ĉi artikolo de s-ro ŠULCO, kiun mi publikigas sensanĝe, por ne doni misan bildon pri la diversaj opinioj pri la ĝusteco en nia lingvo.

"Sed – kaj tion mi volas forte substreki : Esperanto aktuel estas la organo de Germana Esperanto-Asocio, ne la organo de tiu aŭ alia skolo aŭ varianto de Esperanto. Ĉu ne estas alta tempo diri klaran vorton, kio estas Esperanto, kie estas la limoj por lingvovariantoj kun la sama lingvonomo? GEA ja membras en UEA, kiu – en sia statuto priskribanta la uzatan lingvon – referencas kaj al la Fundamento, al la verkaro de Zamenhof kaj al la "lingvouzo kontrolita de la Akademio de Esperanto". Jes, se ĉio glate funkcias ..."

Ndlr – Jen deklaro, kiu meritas apartan atenton! Jen kiel devus reagi ĉiuj redaktoroj de gazetoj! Oni ne devus forgesi la rolon de la AKADEMIO : ĝi devas rememorigi la celon kaj ne-malhaveblan utilon de la "FUNDAMENTO" por internacia lingvo : ĝi estas bazo de tradicio.

AKADEMIA KALENDARETO okaze de la elekto-jaro 1995.

1. Ekde 1-a de Oktobro 1994 la Sekretario de la Akademio sendos Demandaroin kaj al novaj kandidatoj laŭ ilia peto kaj al la Akademianoj de la eliranta Triono, krom se ili tion rifuzas. Li atendos ilian resendon ĝis la 31-a de Decembro. 2. Ekde la 1-a de Januaro 1995 li dissendos tiujn demandarojn al ĉiuj Akademianoj : du monatoj poste tiuj balotos

por elekti la novajn Akademianojn. Ankorau du monatojn poste la Prezidanto anoncos la rezulton. 3. Tuj post tiu anonco, li prezentos la kandidatojn por la nova Estraro : la Akademio havos du monatojn por elekti ĝin. La nova Estraro estos elektita ĝuste antaŭ la Kongresa periodo.

Eliranta triono : Ari-Martinelli, Baceva, Boulton, Chaves, Duc Goninaz, Eichholz, Gregor, Ĝuĝev, Knoedt, Oljanov, Piĉ, Rosbach, Urbanová, Wells, Xie.

La faklingvo en Esperanto



La plej granda vortaro pri la Germana kaj la Angla¹ enhavas 220 000 Anglajn kapvortojn kun 500 000 Germanaj tradukoj kaj en dua volumo 340 000 Germanajn kapvortojn kun 600 000 Anglaj tradukoj. En la Plena Ilustrita Vortaro estas 15 250 kapvortoj^{*}, el kiuj facile fareblas 150 000 vortoj aŭ eĉ pli; la plej nova Esperanto-vortaro en la Germana² havas 40 000 vortojn.

La tradukhelpo de la Eŭropa Komunumo "Eurodicatom" registris po 500 000 elementojn en la Angla kaj en la Franca³. La libro pri ekonomio / financoj / mono⁴ kun la 9 EK-lingvoj kiel helpilo por tradukistoj havas 1 006 terminojn. La esperantista fakorganizaĵo Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo (IKEF) jam provtradukis ĝin⁵ en Esperanton. La plej grava fakvortaro pri ekonomio en Esperanto⁶ havas 2 812 terminojn.

Tio montras, ke eblas multon jam fari en Esperanto sen suferi pro mankoj de terminoj. La fervojistoj priskribis sian medion en nove aperinta vortaro⁷ kun 9 300 fakvortoj el la vortprovizo de Esperanto kaj nur manpleno da neologismoj. Harald Schicke montris ĉiujn detalojn de la Homa korpo⁸ sen novvortoj. Mi mem verkis kvar libretojn pri ekonomiaj temoj kun 241 paĝoj⁹ kun la ekzistantaj vortoj, kaj mi ankaŭ instruas ekonomikon en universitatnivelaĵoj de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) en San-Marino sen lingvaj problemoj.

Tiuj ĵus menciitaj kaj pruvitaj kapabloj estas konvinkaj argumentoj, ke la faka esprimkapablo en Esperanto jam estas eminenta. Kompreneble restas ankoraŭ ne farita laboro. Ekzistas kvantopoblemo, kiŭ ŝajnas esti timiga, sed en la plua rafinado kaj plivastigado de la terminoj en Esperanto ĉio estas solvebla. Temas pri granda defio, kaj venko sur tiu kampo estas decida por la ŝancoj de Esperanto. Ekzemploj kaj novaj ideoj montras la vojon.

1) Der Große Muret-Sanders, eld. Langenscheidt, München.

* Ekzakte 15 214 kapvortoj, plus 26 mallongigoj [laŭ laboraĵo de A. Albault, ne publikita pro la nekapablo de nia eldon-"industrio"]. Oni scias el ĝi, ke aperas kun difinoj en PIV ankaŭ 4 191 finajaj derivaĵoj, 13 165 afiksaj derivaĵoj kaj "nur" 6 267 kunmetoj.

2) Erich-Dieter Krause, eld. Langenscheidt, München.

3) Heinz Zerwes, Das Übersetzungs- und Kostenproblem, vd. p. 59 de la materialoj el la Konferenco pri planlingvoj (Eŭropa Parlamento, 29 SEP 93). Eld. Hanns-Seidel-Stiftung, Brüssel 1994.

4) Commission des Communautés Européennes, Économie / Finance / Monnaie. Brüssel 1985. [Document exclusivement interne].

5) Hans Wiersch (IKEF) 1992. [Nur por prilaborantoj].

6) F Munniksma kaj aliaj (inter ili pluraj Akademianoj). Internacia Komerca-Ekonomika Vortaro en Naŭ Lingvoj. Deventer 1974.

7) Fervoja Terminaro Esperanto-Germana. Bremen 1993 [Eo-G. 183 p.; G.Eo. 188 p].

8) Haralds Schicke, La Korpo de la Homo, Enkonduko al konstruo kaj funkcio. Buchholz 1994. – [Por komparo la profesia Latinlingva verko, Nomina Anatomica, tradukita al la Angla, la Franca, al Esperanto kaj al la Ĉina entenas 6 248 terminoj, plej ofte konsistantaj el pluraj vortoj (Pekino 1989). Indekso en ĉiu el la kvin lingvoj. – A. A.]

9) Dr. Werner Bormann, Konjunkturpolitiko 1989; Entrepreno 1991; Trafiko 1992; Mondkomerco kaj Lingvo 1993, ĉiuj en Hamburg.

Plej grave estas, ke la Fundamentaj elementoj de Esperanto proponas sian vortmaterialon. Kiam ŝipoj altranportis la unuajn grandajn ujojn kun la Anglalingva nomo *container*, altrudiĝis la Esperanto-vorto *kestego*, sed la Esperantistoj preferis la neologismon *kontenero*¹⁰. Tamen la apliko de sufiksoj devus esti la ĉefa rimedo por ricevi novajn terminojn.

Tiel montriĝas la interesa fenomeno, ke terminoj estas sufiĉe ofte "normalaj" vortoj de Esperanto, kiuj perfekte trafas iun fakan sencon. Prave konstatas pri tio la terminare tre aktivaj fervojistoj: *ne ĉiu fakesprimo estas termino – ne ĉiu nacia termino havas internacian signifon*¹¹. Kio tiam gravas, estas lingva disciplino: la regula uzo de tiaj vortoj ĉiam kun ilia faka signifo. Do kio okazas en la merkato, por tio ĉiam servu la "terminoj" *proponado kaj postulado*; al tio bedaŭrinde ne ĉiuj sekvas (vidu en la prelego laŭ piednoto 10).

Multaj vortoj pri tipe naciaj fenomenoj, fariĝintaj terminoj en niaj vortaroj, devenas el simpla Esperantigo. Tiam indas pripensi, ĉu ilia ĝeneraleco estas tiel granda, ke tiuj nocioj havu siajn vortojn en Esperanto. En Plena Ilustrita Vortaro troviĝas la termino *bujabeso*. Se ĉiuj manĝaĵoj de la tuta mondo ekhavu siajn nomojn en Esperanto, ties lingvostoko krevus; preferinde estas nomi tion *Franca fiŝsupo* kun la aldono de ĝia propra nomo¹². Kiam Pola Radio dissendas novaĵojn, vortoj kiel *Sejmo* aŭ *Primaso* estas eventuale komprenataj¹³, sed "la Pola Parlamento Sejmo" aŭ "la Pola ĉefepiskopo Primas N." estus multe pli vaste akcepteblaj.

Amaso da novaj terminoj en multaj lingvoj de la mondo, ankaŭ en la Germana, estas Anglaj vortoj. Jen nur kelkaj: *hearing, carport, streetworker, mailbox, catering, life, aquaplaning, airbag, fast food, marketing, management-buy-out, TV-clip, party, recycling* kaj *leasing* eĉ kun Germanaj participoj... Germanoj sentas la neceson uzi tiujn vortojn. Do por ili temas pri terminoj. Prelegante en la Brita Kongreso de Esperanto antaŭ Anglalingvaj aŭskultantoj, mi demandis pri ilia sento: por ili do ne ekzistas tiu bezono je terminoj, ĉar tiuj vortoj por ili estas "normalaj".

Mi volas rekomendi al Esperantistoj tiun lingvan konduton de Usonanoj, Britoj kaj aliaj Anglalingvanoj. Ĝi estas ŝlosila pozicio por saĝe respondi al la menciita defio.

Sed la rekomendoj jam estas multaj. La problemaro de la faklingvo necesigas sisteman pritrakton, koheran planadon kaj celkonscian agadon. En la organizaĵo portanta Esperanton leviĝis la deziro havi "lingvopolitikon", sed la parlamenteca gvidorgano de UEA, ĝia Komitato, ne volis preni decidon en tiu afero¹⁴, kiun ĝi konsideris tro tikla. En tia ĉirkaŭaĵo la helpinstanco de UEA por la antaŭenigo de la faklingvo, la Terminologia Esperanto-Centro (TEC), fariĝis ne plu vivkapabla¹⁵. Nur plu unuopuloj kaj kelkaj fakaj Esperanto-organizaĵoj aktivas en la terminara laboro.

10) Dr. Werner Bormann, prelego pri la faklingvo dum la Jarkunveno de Dana Esperanto-Asocio (28 MAR 93). – Vd. "La Letero de AdE", n-ro 23, APR 93.

11) Dr. Heinz Hoffmann en "Terminara Kuriero", Komunikilo de faka komisiono de IFEE, Decembro 93, p. 6.

12) Dr. Werner Bormann, Mondlingvo longperiode, en Serta Gratuloria in Honorem Juan Regulo, La Laguna 1987, p. 106.

13) En la Esperanto-dissendoj tiuj vortoj aŭdiĝas (ĉiutage je la 15-a 30 kaj je la 22-a 30 /Mez-Eŭropa Tempo/).

14) Protokolon vd. en "Esperanto", SEP 93, p. 1 051.

15) En la Jarlibro 92 de UEA, p. 28, ankoraŭ listiĝas taskoj kaj personoj, dum en Jarlibro 93, p. 23, neniuj personoj estas plu menciita: restis nur la taskoj.

La Akademio de Esperanto listigas inter siaj statutaj taksoj, ke "ĝi verkas teknikajn terminarojn, aŭ kontrolas kaj aprobas terminarojn, verkitajn de aliaj aŭtoroj"¹⁶. Ĝi laboras tiukampe. Elstaras la *Pekoteko* de Akademiano Eichholz, kiu estas laborrimedo por diskuti vortproponojn¹⁷. Tial ĝi ne helpas ekzemple al lekciisto (kiel mi), kiu uzas terminojn, fidante ke la studentoj komprenas ilin precize¹⁸.

Unu afero estas la libera evoluo de la lingvo, por kiu inter multaj aliaj ple-
das ekzemple Claude Piron¹⁹ : ĉu la ĉielo nur estas blua, aŭ ĉu ĝi bluas? Alia
afero estas la preciza signifo de difinita vorto fake uzata. Ekzemple : kiam sub-
vencioj estas akireblaj, ja estas grave, ĉu ekzistas por tia ŝtata favoraĵo : reko-
mendo aŭ sugesto aŭ propono aŭ konsilo²⁰.

En la internacia kunlaboro regas kompromisoj, kiuj estas zorge formulitaj
– en la ĝustaj nuancoj de siaj vortoj. Se oni iun tagon aplikos Esperanton en
oficialaj internaciaj kontaktoj, tiam oni trovos tiajn interkonsentojn en la inter-
traktada lingvo Esperanto. La vortoj en tiu lingvo devas komprenigi la saman
enhavon al ĉiuj uzantoj. Poste ili ja ĉiuj tradukas la komunan rezulton en siajn
naciajn lingvojn, ĉar en tiuj lingvoj la tekstoj estas jure validaj. Tiam diferencoj
ne aperu! Nur tiukaze la Internacia Lingvo povas plenumi sian funkcion. Do al
tiu servo Esperanto devas esti matura.

Esperanto jam progresis sur tiu ĉi vojo. Tion pravas la prezentitaj ekzem-
ploj. La faklingvo en Esperanto atingis staton, kiu permesas al ni plue aserti, ke
Esperanto kapablas solvi la lingvoproblemon en la internaciaj rilatoj. Unu argu-
mento estas la atingitaj rezultoj. Per alia argumento ni devus kontentige respon-
di al dubantoj, kiel ni solvas la kvantoproblemon. Ĝuste por tiu grava defendo
de la aspiroj de Esperanto la vojoj montritaj en tiu ĉi prelego indikas kiel ni pro-
cedu.

[Prelego eldirita dum la 78-a Brita Kongreso, (Richmond, 2 APR 94)]

16) Aktoj de la Akademio III. Vd. p. 10.

17) Vd. ankaŭ Rüdiger Eichholz, Ĉiu kapablas kontribui al la evoluigo de nia lingvo. Vd. en "La Letero de AdE" (n-ro 24, Julio 93).

18) Vd. la recenzon de Dr. Werner Bormann, Perkomputi- la terminaro en 1 800 paĝoj, en "Heroldo", 10

Julio 93, sur p. 1.

19) Intervjuo kun Pola Radio (dissendita je la 13 FEB 94).

20) Dr. Werner Bormann, Internacia kaj naciaj lingvoj, en 100-jara Esperanto (Jubilea Libro de la Akade- mio), Chapecó 1987. – Vd. p. 33.

ERATUMA NOTO

Koncerne la leteron de s-ro R. *Hauptenthal* al s-ro *Istvan Ertl* aperintan en la n-ro 25 de "LA LETERO", aperis NDIR, kiu montriĝas erara : la letero de 1993-02-13 ja aperis en "Esperanto" n-ro 86 (1993 : 1047 (4), p. 77) kun la surskribo "La fetiĉa lingvouzo".

SKRIBAS LEGANTOJ . . .

Ĉapeloj

Konekse al la artikolo "Kian komputoron aĉeti?" ("Letero" n-ro 23), ŝajnas, ke por anstataŭi la ĉapelon "x" plej bone taŭgas la Latina litero "x": Cx = ĉ, . . . ĝis sx = ŝ. Sed anstataŭ "ŭ" oni povas uzi "w"!

A. Artemoff (Frankfurt, Germanio)

NdIR - Eblas opinii - sed dek kapoj = dek ĉapoj - ke por anstataŭigi la ĉapelon, sin prezentas la plia Fundamenta alfabeto (ch, gh, hh, jh, sh sed ordinara u), kiun Zamenhof proponis jam en la Aldono al la Dua Libro kaj kiu poste ĉiam aperis en la Plena Gramatiko, esenca parto de la Fundamento.

Pri la ĉapelaj literoj mi volus indiki (memorigi?) tre interesan proponon de Prof. G. Waringhien, kiun mi legis antaŭ 30 jaroj (aŭ pli) en la revuo de la Franca Grupo de Instruistoj, kies nomo estis "Esperanto Lernejo".

Rimarkinte, ke ĉiuj vokaloj en la Franca lingvo povas esti surĉapelitaj, li proponis pasigi la supersignon de la surĉapelitaj sur la (dekstran) najbaran vokalon. Li opiniis, ke teksto tiel tajpita tute ne sokus, ŝajnanta tiel natura, tiel Esperanto-kutima, ke apenaŭ oni rimarkus la ŝanĝon.

Tiun konvencion mi ofte uzas, ĉar mi trovas ĝin pli bona (pli komprenebla) ol uzo de aliaj signoj, ekz. de la "h" (tamen necesa por telegramoj).

James Fairbank (Paris)

NdIR. - Jen interesaj elturniĝoj, kiuj montras, kiel bagatela estas tiu ĉapel-problemo. Des pli, ke ĝi jam ne ekzistos, kiam pro la disvastiĝo de la lingvo ĉiuj aparatoj estos ekipitaj per la necesaj litertipoj!

[Ŝajne ne Prof. Waringhien, sed Prof. Boucon (?) tiele proponis. Kaj Waringhien nure raportis pri tio kaj aldonis mildan kritikon; kiel do praktiki la ŝovadon de la ĉapeloj en tiaj kazoj kiel jenaj: neĝborulo (negbôrulo aŭ nêgborulo), poŝtĉeko (postĉêkô aŭ pôstĉêko)? - A. A.]

*

Artefarita : arta, tekna

La vorton "artefarita" mi ĉiam trovis tro longa kaj peza kaj cetero misdira, kiel la unua PIV-a signifo de la vorto "arta" mem. Daŭre mi cerbumis pri alternativoj, kiel "elfarita" aŭ "elfara", kiuj min ne kontentigis. Unu tagon mi feliĉe venis al la nova radiko "tekna" per retroderivado el "tekniko", kaj poste mi eksciis, ke ĝi ja estas la Greka vorto por "arta". Ĝis nun ĝi legeblas en du el miaj artikoloj aŭ recenzoj kaj mi provos enkonduki ĝin en la komunan lingvon. Almenaŭ recenzistoj povu diri, ĉu iu verkas arte aŭ ĉu li verkas tekne.

Georgo Kamaĉo (Madrid)

NdIR - Nur la uzado povos konfirmi tion!

*

Majuskloj

Ne estas vero, ke la vorton "esperanto" ĉiu skribas per majusklo. Mi skribas ĝin minuskle, same kiel la vortojn "volapuko", "sanskrito" kaj "latino" (Proverbaro Esperanta, n-roj 691 kaj 2535). Ankaŭ mi opinias oportuna kaj facila la sistemon subtenatan de Edward Ockey.

Georgo Kamaĉo (Madrid)

Ndir – Se ne ĉiuj, almenaŭ la plimulto uzas la vorton "Esperanto" kun majusklo pro tio, ke origine la vorto estas pseŭdonimo kaj krome la derivaĵoj "Esperanta, Esperante" povas konfuziĝi kun la verbaj formoj de la verbo "espero". Cetere pri majuskligo nur la uzado decidus : ne sufiĉas unu por ŝanĝi plimulton!

[La plimulto uzas "Esperanto". Sed ĉu la uzantoj de "Esperanto, latino, sanskrito" ne sentos sin ĝenataj, se iu rimarkigos al ili, ke ili ŝoviniste majuskligas nur sian lingvon sed minuskligas ĉiujn aliajn! Des pli ke temas pri veraj propraj nomoj; ja iom apartaj : "la Franca", "la Germana" estas esprimoj formitaj el la difina artikolo kaj el nacia adjektivo; principe ili egalvaloras substantivojn; komparu : Esperanto, Latino, Sanskrito. – A. A.]

*

Senpera verbigo de adjektivoj

La preferoj de J. Ducrocq estas kaj estu nur tio : preferoj. Persone mi tre ŝatas verbigon de ĉiaj radikoj, ĉar mi sentas ĉi tian verbigon tre intime Esperanta. Mi rekomendas al s-ro Ducrocq legadon de la tre interesa verketo : "La senpera verbigo de adjektivoj", de H. A. de Hoog, en kiu klare legeblas (p. 7) :

"En Ekzercaro § 7, ni trovas : Kiu kuraĝas rajdi sur leono? Kaj en la sama paragrafo Zamenhof difinis *kuraĝo*/ kiel adjektivon! La signifo de "kuraĝo" nepre ne povas esti alia ol : "esti kuraĝa"!

"En Ekzercaro § 42 Zamenhof mencias la vortojn "sani" kaj "malsani" kaj la imperativon "sanu", kiu ja certe ne povas signifi ion alian ol : "estu sana"!"

Georgo Kamaĉo (Madrid)

Ndir – Ĉu kuraĝo signifas : *esti kuraĝa aŭ agi, impresi kuraĝe jen la demando!* Ĉu "sanu" signifas *estu sana aŭ agu, impresu sane jen la demando!*

[Se oni zorge legas la § 7, oni trovas ion interesan! Unue ne aperas la radikoj *kuraĝo*/ sen finaĵo, sed kun signeto; male aperas ja la tuta vorto *kuraĝo* kun klara finaĵo *a*. Due ne sekvas "difino" sed tradukoj al kvin lingvoj : ĉiuj kvin tradukoj klare estas adjektivaj : inter ili la Angla *courageous*. Aliparte en la Universala Vortaro oni legas post la radikoj *kuraĝo*/ la samajn adjektivajn tradukojn krom unu : la Angla efektive estas substantiva, nome *courage*. Tiu (ĝenerala) aferstato estas analizita en la naŭa eldono de la Fundamento. – A. A.]

*

Finajo de la adjektivoj

En "La Gazeto" (n-ro 42, 30 OKT 1992, p. 14) sub la plumo de Georgo Kamaço legiĝas tio ĉi: *ambajn : akuzativa formo de *ambaj aŭ ambaŭ. La Fundamenta Gramatiko klare diras : la adjektivo finiĝas per -a. Kazoj kaj nombroj kiel ĉe la substantivo." (La asteriskoj estas de mi, c.jg).

Mi ne povas konsenti :

1/ La Tabelvortoj je -u estas adjektivoj, sed sen finaĵo -a.

2/ La vorteto "unu" povas esti adjektivo, t.e. pli ekzakte duondifina adjektivo. Ĝi nek finiĝas per -a, nek ricevas la akuzativan finaĵon :

– Ekzercara § 11 : Unu vidvino . . . – Ekzercara § 12 : El siaj multaj infanoj unuj estas bonaj kaj aliaj estas malbonaj.

– La esprimo : unu la alian.

3/ Ekzistas nur "ambaŭ" sed ne la radiko "*amb/" :

– UV : ambaŭ : l'un et l'autre | both | beide | oba | obaj.

– Ekzercara § 11 : (. . .) ili ambaŭ estis tiel malagrablaj (. . .)

4/ Laŭ PIV "ambaŭ" estas nevaria pronomo kaj adjektivo. Oni do devus ekzakte distingi inter pronoma "ambaŭ" kaj adjektiva "*ambaj". Kion signifus "*ambe"? Ĉu "*ambaj" = "*ambe da"? Ĉu rajtus ekzisti singularaj "*amba" kaj "*amban"? Ĉu jen Esperanta adjektivo, kiu ekzistus nur plurale? Tio komplikigus la lingvon. Mi opinias, ke nevaria "ambaŭ" estas same praktika kaj komforta kiel la nevaria "unu", kie distingo inter numeralo "unu" sen akuzativa -n kaj adjektiva-pronoma "unu" kun ebla -n malfaciligus la vivon. Por ne esti superekzakta kaj tro Ideca Esperanto prave havas la navariajn "unu" kaj "ambaŭ".

Kiu pledas por "*ambaj" kaj "*ambajn", tiu devus same pledi por "*unun". Pledi por "*ambajn" sen "*ambaj" estas bizare. Ĉiukaze tio tre ŝanĝus nian lingvon. Same kiel "unu" kaj "ambaŭ", la tabelvortoj je -es ne povas porti la akuzativon. Ĉu apud "*unun" kaj "*ambajn" enkonduki "*kiua" (kiua / kiuan / kiuj / kiujn) por havi pluralon kaj / aŭ akuzativa(j)n formo(j)n de "kies"? Ni prefere ne komencu ŝanĝi ion!!! Kion vi opinias?

C. J. G.

Ndir – Tiu ĉi ekzemplo montras, kiel imagopova estas la homo : oni ne forgesu, ke lingvo estas socia komunikilo. Ekprovi ion estas individua rajto, sed sen altrudemo. Se ĉiuj konsentas pri nova formo, bone; sed inverse se ĉiuj kontraŭas, ĉu racie obstini?

LA LETERO DE L'AKADEMIO DE ESPERANTO. Trimestra informala letero eldonita de "La Amikoj de l' Akademio de Esperanto", 5, rue Léon Cogniet, 75017 PARIS, Francio. – Redaktoro : Jean THIERRY – Direktoro de la publikaĵo : André BOURDEAUX. – Presejo : COCONNIER, 72300 SABLÉ. – C.P.P. : n-ro 6971. – Prezo : 1 n-ro : 40 FRE – Jara abono : 120 FRE – Pagebla : ĉe kontoj : Banka : Crédit Lyonnais n-ro 7090 F – Poŝtĉeka : 735 27 B Paris. – UEA : Poŝta Banko Nederlando 37 89 64 (ĝirofiĉejo Den Haag) : nepre indiku "por la Amikoj de l' Akademio de Esperanto" (40 gld).

Perantoj por diversaj landoj :

Aŭstralio : Libroservo de AEA, Post Office Box 230, MATRAVILLE, N.S.W., 2036 Aŭstralio.

Azio (tuta) : S-ro UMEDA Yosimi, I.R.O.B. 5458, TOKYO 100-31, Japanio.

Benelukso : Eldonejo kaj Librejo SONORIO. Doornstraat 22, B 2610 WILRIJK, Belgio. PCK 000-0152140-44. – Kreditkartoj EUROCARD, MASTERCARD aŭ VISA, JCB cards aŭ AMERICAN EXPRESS : sciigu numeron, valdido-periodon kaj la nomon de la kreditkarto. Ne forgesu subskribi! Jarabono : 881 BEF [Telefono + telefaxo : +32 3 827 24 05. – Tage kaj nokte + aŭtomata respondiloj.

Brazilo : Brazila Esperanto-Ligo : ScS Ed Jockey Club – Sala 103. BR 70300 BRASILIA DF (Caixa Postal 11 11 05), Brazilo.

Germanio : S-ro Claus J. GÜNKEL, Im Lichtenfelde 70, D 33100 PADERBORN, Germanio. Poŝtĝiro Hannover (bankkodo 250 100 30), konto-n-ro 5706 31-301 (36 DM).

Kubo : S-ro Orlanda RAOLA Gonzalez (E-o-Redakcio de Radio Havano), Longa 220, apt 5, Mantilla, 13800 LA HABANA, Kubo.

Meksiko : S-ro Enrique LEMUS Rodriguez, Insurgentes Sur, 3493 villa Ilimpica edif. 27-001, 14020 TLALPAN MÉXICO DE Meksiko.

Svedio : Sveda Esperanta Federacio : c/o Lisbet ANDREASSON, Södra Rörum pl. 455, S 242 94 HORBY, Svedio.

Usono : Eldonejo Bero : P.O.Box 13492, BERKELEY CA 94701, Usono (23 \$).